

Svisa federismo

Claude Gacond, 153-a radioprelego, 1966.09.07 & 1966.09.10

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond pri la svisa federismo kaj la provo federi Eŭropon.

Studante la svisan historion multaj personoj konkludas, ke pli ol kvin jarcentoj estis necesaj por iom post iom konduki la svisajn kantonojn al federigo. El tio ili trovas vane provi federi Eŭropon.

A.- Pli atente rigardata la svisa historio pruvas ion alian. Pli ol kvin jarcentoj estis necesaj al la svisaj ŝtatoj por pli kaj pli eksperimenti la malagrablajojn de tre kompleksa sistemo de aliancoj inter absolute suverenaj ŝtatoj. Subite, pro decidiga krizo, la milito **Sonderbund**, ili sentis la mankon de superŝtata aŭtoritato. Tiam nur naŭ monatoj estis necesaj por starigi la nunan svisan federacion.

Cl.- La atenta studanto de la svisa historio ankaŭ malkovras, ke la nocio pri federismo ne naskiĝis en la tempo de Wilhelm Tell, kiel la svisa folkloro ŝatas aserti. Tiu nocio estas prunto el Ameriko. Se la nordamerikanoj ne estus redaktintaj en 1787 la Usonan Konstitucion, kiu klopodis kunvivigi du kontraŭajn tendencojn: centralismon kaj emon al aŭtonomeco, tiam la svisoj verŝajne ne estus kreintaj en 1848 sian Helvetan Federacion nomatan en la neŭtrala latina lingvo **Confederatio Helvetica**.

A.- Ĝis la krizo de 1847 estis kvazaŭ tabuo paroli pri svisa registaro. La defendantoj de la ideo pri svisa federismo estis konsiderataj kiel malbonaj patriotoj.

Cl.- En la ĝeneva parlamento la naturalisto Augustin-Pyrame de Candolle esprimis la vidpunkton de la patriotoj. Estis en 1832, nur 16 jarojn antaŭ la fondo de la svisa federacio. Aŭdu lin:

A.- « *Kion deziras la proponantoj de nova pakto? Ili deziras tion, kion ni ne povas akcepti, nome federacian respublikon anstataŭ kunveno de suverenaj ŝtatoj. [...] Kun geografia situacio, moroj, tradicioj, lingvo, kiuj nin diferencigas de la aliaj ŝtatoj, ni ne povas deziri sistemon, kiu nin devigus pli malpli oferi nian propran naciecon.* »

Cl.- Ĉu hodiaŭ en Eŭropo patriotoj ne esprimas la samajn asertojn kontraŭ la defendantoj de Eŭropa Federacio? Reaŭdu ankoraŭfoje tiujn belajn frazojn, kiel se ili elirus la buŝon de nuna ŝtatestro:

A.- « *Kion deziras la proponantoj de eŭropa federacio. Ili deziras tion, kion ni ne povas akcepti, nome federacian respublikon anstataŭ kunveno de suverenaj ŝtatoj. Kun geografia situacio, moroj, tradicioj, lingvo, kiuj nin diferencigas de la aliaj ŝtatoj, ni ne povas deziri sistemon, kiu nin devigus pli malpli oferi nian propran naciecon.* »

Cl.- Ĉu ne strange kiel samaj historiaj procezoj ripetiĝas. Dum la sama diskuto alia ĝeneva parlamentano Lafontaine nomis **utopia** la proponon fondi tutsvisan unuiĝon. En *Federala sperto* Edmond Privat citas unu el liaj asertoj. Aŭdu:

A.- « *Ĉiu kantono tro ŝatas sian suverenecon kaj rigardas ĝin kiel tro karan trezoron por deziri reĝimon, kiu ĝin grave malfortigus.* »

Cl.- Pro tiu blindeco Svislando travivis 15 jarojn poste interkantonan militon. La traŭmo kaŭzata de tiu milito nomata **Sonderbund** estis necesa por malfermi la okulojn de la svisoj. Nova generacio tiam komprenis, ke la politika realeco ne plu apartenas al Ligo de suverenaj ŝtatoj sen centra registaro, sed al federigo de tiuj 22 kantonoj profite al la naskiĝo de nova civitaneco tutsvisa.

Svisa federismo

Claude Gacond, 153-a radioprelego, 1966.09.07 & 1966.09.10

A.- William Rappart, la historiisto de la svisa federismo, skribas tion pri tiu epoko kaj metamorfozo :

Cl.- « *La svisa publika spirito, kies proverba mallarĝeco spegulas samtempe la topografion kaj historion de eta lando, sin ĉiam ribelis kontraŭ la postuloj de komuna vivo. Kiam la politikaj kaj ekonomiaj interesoj de la kantonoj incitos ilian alproksimiĝon aŭ eĉ ilian kunfandiĝon, tiam la preferoj de iliaj loĝantoj ne ĉesis postuladi propran daŭran sendependecon. La federacia ŝtato aperas kiel kompromiso inter tiuj interesoj kaj preferoj.* »

A.- Kiel en Usono la federigo kunvivigas du kontraŭajn tendencojn : centralismon kaj emon al aŭtonomeco. La svisaj kantonoj akceptis federigi, tio signifas oferi parton de sia suvereneco al superkantona aŭtoritato, nur kiam la svisoj konstatis, ke kunvivado de 25 sendependaj suverenecoj fariĝas netolerebla.

Cl.- Sed antaŭ ol akcepti tiun federigon la kantonoj, nekapablaj akordiĝi pri komuna svisa politiko, faris al si reciproke teruran ekonomian militon. En 1847 oni kalkulis en Svislando proksimume 400 doganpostenojn, kiuj taksadis la interkantonan trafikon, tio signifas 70 pli ol en la komenco de la deknaŭa jarcento. Dogano ekzistis ĉie, escepte sur la komunaj eksteraj limoj. Sur la gotarda vojo la kantoj Tiĉino ekzemple en dektri lokoj taksadis la vartrafikon. Ĉiufoje estis devige malŝarĝi la varojn por ilin pesi.

A.- Pro tio la internacia komerco evitis Svislandon. Kaj la svisoj mem ne povis uzi la proprajn vojojn. La industriistoj de Sankt-Gallen sendis siajn varojn al Ĝenevo tra Besançon en Francio kaj al Italio tra la pasejo Brenner en Aŭstrio.

Cl.- Ĉiu kantoj volis trudi sian volon al la ceteraj. Estas la politiko pri potenco. Aŭtomate formiĝis koalicioj por rezisti al tiuj premadoj. Pro manko de centra aŭtoritato la konfliktoj neniam povis solviĝi. Kontraŭe jaron post jaro ili akriĝis. Nur la armiloj fine povis decidi.

A.- De 1291 ĝis 1848 Svislando travivis multajn interkantonajn militojn. Hodiaŭ la historiaj lernolibroj nomas ilin civilaj militoj, sed fakte ili estis internaciaj, ĉar ĉiu kantoj estis vera nacio. Hodiaŭ la svisoj tion malfacile komprenas. Pro tio la vorto **civila**.

Cl.- Kion la ĝeneva parlamentano Lafontaine nomis utopio, tio fariĝis en la koroj de tuta nacio ĉiutaga realaĵo. Povu foje okazi la sama metamorfozo en Eŭropo kaj en la Mondo. Tiam la internaciaj militoj ankaŭ ŝajnos civilaj konfliktoj al la infanaro dum la instruado pri historio.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon !

Cl.- Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-